

ISRAELA ESPERANTISTO



ISSN-1565 3315

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo

האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו

La Internacia Esperanto-Muzeo iras interreten, historiaj E-afiŝoj

Spertoj el la 99-a UK en Bonaero

Impresoj de Israelo

La Israela Esperanto-Kongreso



<i>Redaktoro</i>	<i>Provlegantoj</i>	<i>ELI-Prezidanto</i>	<i>Redakcia adreso</i>
Amri Wandel	Gabi Zeevi Eldad Salzman	Amri Wandel	P.O.K. 22041, 61220 Tel-Avivo eli@esperanto.org.il



Karaj legantoj,

Anstataŭ la somera numero de ĉi-jarkolekto vi ricevis kiel eksterserian numeron la memorlibron "Esti aŭ ne Esti". Komence de tiu ĉi vintra numero vi trovas artikolon pri la historiaj

Esperanto-afiŝoj en Palestino kaj poste Israelo. Sekvas artikoloj pri la 15-a Israela Kongreso, pri ĝia antaŭ-kongresa ekskurso, kaj pri la 99-a UK en Bonaero. Fine la israela sperto pri kiu Ludmila Novikova rakontis hejme, kaj invito al Israelo kaj al la 16-a Israela Kongreso en Jehiam. *Amri*

Retejo:

<http://esperanto.org.il/ie.html>
Fondita 1959 kiel *Nia Ligilo*

Enpaĝigo:

kaj fotoj sen indiko de fotisto
A.Wandel

Kovrilo: Grupa foto de la 15-a Israela Kongreso apud Arad.
Fotis: Shirli Gaon.

Abontarifo eksterlanda:

10 EUR. Eblas pagi per UEA-konto *elia-q* aŭ mendi ĉe la Libroservo de UEA.

Enhavo

- 3 Esperanto-agado en Israelo dum 2014
- 5 La Esperanto-muzeo – interreten!..... *Bernhard Trudier*
- 10 La 15-a Israela Esperanto-Kongreso kaj
la Holokaŭsta memortago en Yad Vashem *Amri Wandel*
- 11 Nia unua vojaĝo al Israelo *Karl Breuninger*
- 14 Spertoj de la Universala Kongreso en Bonaero *Jael Ŝelaĥ*
- 17 Kion mi rakontis hejme pri Israelo *Ludmila Novikova*
- 23 Indas viziti Israelon!..... *Joela Egozi*

Esperanto-agado en Israelo dum 2014

Januaro. Delegacio de kvin israelanoj (inter ili du fratinoj kaj nevino de Esti) partoprenis en la Internacia Festivalo en Germanio, kaj okazigis memorprogramon por Josi kaj Esti. Du prelegsalonoj estis nomitaj memore de Josi kaj Esti. **Dum la tradicia Silvestra Balo, je la 23a horo (noktomeze laŭ israela tempo)** la israelanoj salutis la 120 partoprenantojn por la novjaro, nome de la esperantistoj en Israelo.



Aprilo. Okazis la 15-a Israela Esperanto-Kongreso (vidu artikolojn sur paĝoj 10-11).



Dum la Holokaŭsta memor-tago en Yad Vashem en Jerusalemo **Malka Zemeli, Gian Piero Savio kaj Amri Wandel metis florkronon nome de ELI kaj UEA.** La preparolisto invitis la reprezentantojn de ELI en perfekta Esperanto.

Komence de **Junio**, Okaze de la pentekosta festo, la israela radio (Galej Cahal) intervjuis Amri Wandel vive pri Esperanto, en la nokta programo "Ciporej Lajla" (noktaj birdoj). La 20-minuta verva intervjuo estas

aŭskultebla rete ĉe la adreso

<http://esperanto.org.il/dosieroj/wandel20140603.mp3>

En **Julio** okazis la somera landa kunveno de ELI. Ĉeestis ĉ. 30 personoj kaj oni prezentis kantojn, skeĉon, prelegojn kaj...

akvomelonojn "Esperanto".

Meze de la kunveno oni devis ĉesi por kvaronhoro pro la kontraŭ-rakeda alarmo "ruĝa koloro".



Akvomelonoj "Esperanto" dum la ELI-landa kunveno

Fine de Julio tri israelanoj partoprenis la UK-on en Bonaero. Vidu artikolon sur paĝo 14.

En **Septembro** okazis memorgespeto por Esti Saban, kiu forpasis en la pasinta jaro. En la klubejo estis disdonita la memorgespeto "Esti aŭ ne Esti" (108 paĝoj, kun multaj bildoj, red. Amri Wandel, eldonis ELI, papera ekzemplero 5 eŭroj ĉe ELI kaj UEA). Rete:

<http://www.esperanto.org.il/dosieroj/saban.pdf>

En **Oktobero** okazis publika programo pri Esperanto kun Amri Wandel en la prestiĝa kultura instituto Bet Avi Ĥai en Jerusalemo. Komence la konstanta gvidanto de la programo, prof. Avigdor Ŝinan intervjuis Amri (kun enkonduko en Esperanto!) kaj sekve Amri faris duonhoran hebrelingvan prelegon pri la praktika kaj ideologia aspektoj de Esperanto, historio, UEA, UK kaj konciza leciono. Reta surbendigo de la publika programo <http://wpc.3d64.go-live.co.il/003D64/lectures/esperanto.mp4> la parto pri Esperanto komenciĝas en la minuto 9:40.

La Esperanto-muzeo kaj la planlingva kolekto de la Aŭstria Nacia Biblioteko iras interreten!

Bernhard Trudier, Aŭstrio

Antaŭ kelkaj monatoj ELI ricevis peton de la Aŭstra Nacia Biblioteko traduki kelkajn historiajn afiŝojn de Esperanto el Palestino kaj Israelo. Skanaĵoj estas rete videblaj en la nova retejo de la Aŭstria Nacia Biblioteko: <http://www.bildarchivaustria.at/Pages/Search/QuickSearch.aspx>.

Serĉante per "israel" kaj "esperanto" oni trovas nekredeblan kolekton de 34 afiŝoj kaj fotoj pri Esperanto-kursoj kaj renkontiĝoj en Israelo inter la jaroj 1926-1990. Sekve mi petis la direktoron de la Esperanto-muzeo en Vieno verki artikolon por Israela Esperantisto pri la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperanto-muzeo en Vieno.

La valoro de muzeoj konsistas ne nur en la objektoj montritaj, sed ankaŭ en la havaĵo, kiun ili konservas en stokejoj. Tiel en la Esperanto-muzeo en Vieno oni povas vidi nur relative etan parton, sed per daŭra ciferecigo jam granda parto de la materialo estas videbla en la interreto!



Vesperaj lecionoj de Esperanto en la Esperanto-Asocio "Paco kaj Frateco" (1926)

En 2005 la [Kolekto por Planlingvoj](#) kaj la [Esperanto-muzeo](#) translokiĝis en novan sidejon en la Palais Mollard, kiu situas en la centro de Vieno, Herrengasse 9. La nova sidejo donas ne nur lokon por la Esperanto-muzeo kaj la legsalono de la Kolekto por Planlingvoj, sed same por granda kaj moderna konservejo, kiu estas ankaŭ klimatizita kaj sekura kontraŭ incendio.



Prelego de d-ro E. Olsvanger en la Jerusalema Esperanto-Asocio "Paco kaj Frateco" okaze de la 16-a datreveno de la forpaso de Zamenhof (1933)

Pro la translokiĝo la muzea ekspozicio estis teknike modernigita kaj enhave aktualigita: Tiel la Esperanto-muzeo nun ne nur prezentas la lingvon Esperanto kaj temojn el la historio de la Esperanto-movado, sed ankaŭ ĝenerale la rilaton de homo al lingvo kaj al la lingva problemo. La muzeo montras, ke planlingvoj ekestis en specifaj kaj konkretaj, historiaj kaj kulturaj kunteksto, kaj tiel ĝi ankaŭ ilustras, ke Esperanto estas parto de transnacia kulturhistorio kaj manifestado de speciala lingva kreiveco. Krom Esperanto estas prezentitaj ankaŭ aliaj planlingvoj, ekzemple la Lingua Ignota de Hildegard von Bingen, la muzika lingvo Solresol de Jean François Sudre, la Novslava Lingvo de Ignaz Hošek aŭ la Klingona de la lingvisto Marc Okrand. Objektoj en vitrinoj kaj filmo montras la historian dimension de la fenomeno planlingvo kaj kvar interaktivaj komputiloj

ebligas aktivan informadon, per kiu la vizitanto mem povas elekti la ampleksojn de la informoj.

Centraj servoj de la Esperanto-muzeo estas regule okazantaj aranĝoj, ekzemple la longa nokto de la muzeoj, la malferma tago de la muzeoj kaj precipe specialaj programoj por gelernantoj, la tiel nomataj „Wissenswelten“, dum kiuj la gejunuloj ankaŭ partoprenas Esperanto-fulmkursojn. Dum la pasintaj jaroj la nombro de la vizitantoj daŭre kreskis tiom, ke en la jaro 2013 jam pli ol 14.000 interesigantoj vizitis la muzeon.

Aldone al tiu sukceso la Esperanto-muzeo strebas eĉ pligrandigi la kontakton kun la publiko, kaj tiel en giganta fortostreĉo fotis aŭ skanis grandan parton de la havaĵo por meti ĝin en la interreton. Sekve, la skanaĵoj de la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperanto-muzeo estas kvazaŭ virtuala ekspozicio kaj tial plivastigo de la reala muzeo.

Ekde la jaro 2007 la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperanto-muzeo realigis plurajn projektojn pri ciferecigo: ĝis nun estis skanitaj pli ol [400 libroj](#) kaj

[45 diversaj periodaĵoj](#), kiuj estas libere kaj senpage legeblaj sur la retejo de la Kolekto por Planlingvoj. Krome de tio pli ol 2.500 muzeaj objektoj, pli ol 2.000 bildpoŝtkartoj kaj ĉirkaŭ 7.000 fotoj estis enretigitaj en la bilddatumbankon „[Bildarchiv Austria](#)“. Dum la pasintaj jaroj ankaŭ estis



ciferecigitaj ĉirkaŭ 200 Esperanto-sonbendoj, kiuj aŭskulteblas en la legsalono de la Kolekto por Planlingvoj, kaj ĉi-jare plua projekto efektiviĝis: pli ol 800 afiŝoj estis skanitaj kaj jam videblaj en la „Bildarchiv Austria“.

Kolektado, konservado, esplorado kaj disponigo estas la bazaj funkcioj de ĉiu muzeo. Tiajn taskojn la Esperanto-muzeo plenumas jam dum pli ol 85 jaroj. Pro tio la kolekto kontinue kreskis tiel, ke ĝi nuntempe gardas interalie pli ol 1.200 afiŝojn el la pasintaj 125 jaroj.

La afiŝoj en la Esperanto-muzeo estas tiel diversspecaj kiel ilia historio. La listo estus tro longa, por nomi ĉiujn specojn. Inter ili estas afiŝoj pri universalaj, landaj aŭ fakaj kongresoj, afiŝoj pri foiroj, festivaloj aŭ koncertoj, pri turismo, kursoj aŭ prelegoj. La plej malnova Esperanto-afiŝo estas el la jaro 1906 pri la 2-a Universala Kongreso en Ĝenevo.

La plej malnova el ĉiuj estas Volapük-afiŝo el la jaro 1890 kaj momente la plej nova el la jaro 2014 pri la 99-a Universala Kongreso en Bonaero.



Esperanto-kurso okaze de la 52-a UK en Tel-Avivo (1966)

Afiŝoj estas kolektindaj, konservindaj kaj dokumentindaj. Imprese kaj vive, ofte bunte, ili ilustras pasintan tempon kaj tiel peras interesajn historiajn enigardojn. Ili ne ekzistas sen signifo, ili ne ekzistas per si mem, sed per ilia mesaĝo kaj funkcio el la



Landa konferenco de ELI en Netanja, 1966

tempo de sia estiĝo. Se oni ne ĝustatempe kolektas kaj konservas ilin, ili perdiĝas kune kun la rakontoj, kiujn ili transportas.

Inter la afiŝoj estas ankaŭ pluraj, kiuj estiĝis en Israelo, precipe dum la 60-aj jaroj: ekzemple unu pri la 14-a Landa Konferenco de Esperanto-Ligo en Israelo en Netanja (1966), aŭ alia pri festo okaze de la naskiĝtago de Ludoviko Zamenhof (1966), kiun ankaŭ ĉeestis kiel festparolantoj Avraham Bar Menachem – la tiama vicurbestro de Netanja – kaj Henryk Maschler.

Bedaŭrinde, afiŝoj povas relative facile suferi multspecajn difektojn, des pli gravas, ke oni fake prizorgu kaj konservu ilin. En la Esperanto-muzeo ili troviĝas en speciala stokejo – en apartaj tirkestoj – klimatizita, sekura kontraŭ incendio kaj alirebla nur por personoj kun speciala permeso. La temperaturo kaj la aera humido estas idealaj por daŭra protektado kaj kongruas kun la plej aktualaj normoj preskribitaj de specialistoj por garantii la konservadon de la materialo.

La Esperanto-muzeo ne nur gardas malnovajn afiŝojn, sed ĝi ankaŭ aktive kolektas nuntempajn por montri kaj transdoni al futuraj generacioj historiojn, kiujn rakontas la kolektaĵoj pri la nunaj Esperanto-vivmedioj.

Retejo de la Kolekto por Planlingvoj:

<http://www.onb.ac.at/eo/planlingvoj/index.htm>

Retejo de la Esperanto-muzeo:

<http://www.onb.ac.at/eo/esperantomuzeo/index.htm>

La 15-a Israela Kongreso de Esperanto kaj holokaŭsta memortago en Yad Vashem

Amri Wandel

Aperis en Revuo Esperanto, Junio 2014 (ĉi sube estas foto de la artikolo tiel kiel ĝi aperis en la revuo).



En Israelo

Kongreso beduenstila kaj UEA-florkrono

Imagu Esperanto-kongreson meze de dezerto, la prelegoj okazas en beduenna tendego dum ĉirkaue paŝtas kameloj... Fine de aprilo okazis la 15-a Israela Kongreso en beduen-stila gastejo apud la Morta Maro. En la programo abundis ekskursoj, i.a. al la apuda Masado, la lasta bastiono de la juda ribelo kontraŭ la romianoj, kiu estis elektita kiel monda heredaĵo de Unesko. Okazis prelegoj pri "Movado kaj turismo". La Euritmia Ensemblo de Jerusalemo, kiu en junio turneos en Germanio kaj Svisio, prezentis danc-spektaklon inkluzive de tri pecoj en Esperanto. Antaŭ la Kongreso okazis sestaga antaŭkongresa ekskurso al la Morta Maro, Eilat kaj Jordanio, kiun partoprenis eksterlandaj kaj israelaj s-anoj. La antaŭkongreso kiel ankaŭ

ĉiuj kongresaj ekskursoj estis profesie gviditaj de Amri Wandel, la unua licencita Esperanto-ĉiĉerono en Israelo. Fotoj videblas ĉe <http://bit.ly/beduenstile>

Unu tagon post la fino de la Israela Kongreso, en la Holokaŭsta memortago (27/4) okazis ceremonio en Yad Vaŝem kun la ĉeesto de la prezidento kaj ĉefministro de Israelo, krom delegacioj de pli ol cent organizaĵoj tutmonde. ELI-representantoj metis florkronon nome de UEA kaj Esperanto-Ligo en Israelo. La priparolisto invitis ankaŭ en Esperanto, samkiel pasintjare. Auskultu la surbendigon en youtube <http://bit.ly/holokaustanemortago>.



esperanto 1281 (6) junio 2014

Nia unua vojaĝo al Israelo

Karl Breuninger, Germanio

Ekskurso tra la Morta Maro, Eilat kaj Jordanio antaŭ la Israela Kongreso

Mia edzino Christel kaj mi decidis fine de 2013 partopreni unu semajnlongan gvidatan rondvojaĝon tra la norda parto de Israelo, kaj ni planis plilongigi nian vojaĝon per memstara veturo al la suda parto. Dum la novjara Internacia Festivalo mi renkontiĝis kun Amri Wandel en Germanio kaj li tuj proponis al ni partopreni en la planita postkongresa vojaĝo de la Israela E-Kongreso. Ni interkonsentis, sed poste evidentiĝis, ke la kongreso estis prokrastita al pli malfrua dato. Amri tuj ofertis specialan vojaĝon por ni. Ni ĝoje akceptis kaj atendis interesan ĉiĉeronadon. La 4an de Aprilo li kun samideanino Pnina Sebban venis al nia hotelo en Jerusalemo, kaj ni vizitis la unuan surprizon survoje al Jeriĥo: la muzeo de la Bonfara Samaritano.

Tiu unika muzeo situas apud la ĉefŝoseo n-o 1 de Jerusalemo al la Morta Maro, sed verŝajne malmultaj eksterlandanoj vizitas ĝin. La belaj kaj grandaj ekstere prezentitaj mozaikoj tre impresis nin. Amri tre sperte klarigis la ekspoziciaĵojn de la muzeo. Poste ni trapasis la famkonatan

punkton de la marnivelo, kaj atingis Jeriĥon, kiu estas laŭdire la plej antikva urbo en la mondo kaj sendube ankaŭ la plej malalte situanta urbo. Por ni estis surprizo, kiel facile ni eniris la teritorion de Cisjordanio. La tre komplikan



Karlo kaj Christel kun Amri ĉe la Hiŝam-palaco en Jeriĥo

politikan situacion de la kunvivo de la loĝantoj de Israelo kaj de Cisjordanio ni, kiel eksterlandanoj, ne povis rimarki. Unue ni vizitis la palacon de Hiŝam, kie ni verŝajne ne rimarkus sen la helpo de Amri la vastan mozaikon kovritan de tapiŝoj kaj sablo. Tiel oni piediras tra tiu valoraĵo.

Post la luksa tagmanĝo ni per telfero veturis al rusortodoksa monaĥejo en la montaro je la loko kie laŭ la tradicio Jesuo rezistis dum 40 tagoj al la tento de la Diablo. Vespere ni atingis la Mortan Maron, ĝuis la eksterordinaran sperton de banado en salakvo, kaj tranoktis en kibuca gastejo.

La sekvontan tagon ni vizitis la plej malaltan naturrezervejon Einot Tzukim kaj promenis tie. Ni tre klare povis imagi la malaltiĝon de la nivelo de la Morta Maro dum la pasinta jarcento, kaj Amri montris survoje tra la marbordo la PEF-indikon de la tiama akvo-nivelo markitan antaŭ pli ol 100 jaroj sur roko.

Poste ni atingis Ein Gedi kaj migris tra rivereto David al akvofalo, kie ni




Ges-roj Breuning, Pnina kaj Amri ĉe David-akvofalo en Ein Gedi

ĝuis la freŝan kaj puran akvon. Sekve ni migris en la apuda rivero Arugot. Estis la komenco de la israelaj printempaj ferioj, kaj amasoj da gejunuloj migris en ambaŭ riveroj. En vadio Arugot oni kutime migradas ĝis la Kaŝita Akvofalo, sed Christel kaj mi ne atingis ĝin pro manko de tempo. Ni preferis rigardi la naturon. Ni tranoktis en Ein Bokek en hotelo gvidata de rusaj novenmigrintoj el iama Sovetunio, kie ni sentis nin kiel en Soĉi en la sepdekaj jaroj. Matene ni migradis tra la vadio Bokek al alia akvofalo, kaj surprize por ni: la pado gvidis nin tra la akvo. Estis alia nova sperto migri en akvo en dezerta pejzaĝo. Miriga

estis por ni ankaŭ la informo, ke kelkfoje homoj dronas pro subitaj inundoj tra la diversaj vadio-kanjonoj.

Poste ni denove banis en la Morta Maro, kaj intertempe Amri bedaŭrinde havis paneon en la pneŭo kaj ni perdis kelkajn horojn, kiuj mankis poste en Eilat je la golfo de Akaba. En Eilat bedaŭrinde Pnina devis forlasi nin, sed Amri prizorgis novajn kunvojaĝantinojn: Fida Muĝrabi kun ŝiaj du konatulinaj. Fida estas araba israelanino, kaj ŝia flua araba parolo kaj alloga aspekto multe helpis dum la longa proceduro trapasi la landlimon al Jordanio. Post tri horoj ĉe la limo ni daŭrigis la veturon al vadion Rum, kie ni ĝuis neimageble bonan tempon. Plaĉis al ni ne nur la variaj koloraj



Ges-roj Breuninger, Fida kaj Amri en Petra

geologiaj formoj, sed ankaŭ la diversaj plantoj, el kiuj multaj eĉ floris. La loka jordania ĉiĉerono diris, ke antaŭ du semajnoj pluvis, kaj sekve ni estis bonŝancaj ĝui la rezulton de akvo en la dezerto. Ni ankaŭ spertis iomete la vivmanieron de la beduenoj. Post la sunsubiro ni devis forlasi vadion Rum kaj post kelkaj horoj atingis Petra. En la sekva mateno ni vizitis tiun famkonatan historian lokon, piedirante tra impona roka kanjono. La pejzaĝo ofte ŝanĝiĝis kaj ni vidis monumentojn de diversaj epokoj,

inkluzive de akvokondukiloj kaj akvodeponejoj. Subite post trapaso de la malluma mallarĝa kanjono Sik ni ekvidis la faman templon fositan en la sabloroko. Ni vizitis ankaŭ la amfiteatron, diversajn loĝkavernojn kaj tombotemplojn kun diverskoloraj rokoj, kaj atingis la romian vendejo-

straton kun grandaj kolonoj. Tie Christel kaj mi decidis malrapide reiri kaj sorbi la belan ĉirkaŭaĵon.

Posttagmeze ni reveturis suden al limpasejo Arava. Post longa atendo ĉe la landlimo, kie la jordania ĉefo de la ekipaĵo preferis konversacii kun Fida ol plenumi sian laboron, ni atingis nokte Eilat. La sekvonta tago jam estis nia lasta komuna tago. Post mallonga subakviĝo kaj admirado de la diverskoloraj fiŝoj kaj koraloj, ni veturis al la Ruĝa Kanjono, kaj tie migris profitante la perfektan prizorgon por la migrantoj. Ĉie estis instalitaj



sekuraj teniloj kaj ferŝnuroj, por ke ankaŭ nefakuloj sekure povu trapasi malfacilajn lokojn. Survoje al la granda kratero Ramon ni trapasis la Negev-dezerton, vidis la landliman barilon inter Israelo kaj Egiptio, kaj surprizis nin, ke eĉ en la dezerto kreskas vinberoj, neimageble por ni en Eŭropo. La muzeo en la urbeto Mitzpe Ramon estis fermita, sed ni ĝuis la mirindajn pejzaĝojn de la kratero viditajn de la krutaj klifoj.

← Ĉe la kratero Ramon

Ni pluveturis al Tel-Avivo, kie finiĝis nia speciala rondvojaĝo tra tiu bela, por ni nova kaj nekonata dezerta regiono. Ni

adiaŭis Amri, Fida kaj la du aliajn kunvojaĝintojn. La lastan tagon ni memstare piede vizitis la antikvan urbon Jafo, kaj vespere Pnina akompanis nin por komuna vespermanĝo. Ni korege dankas ĉiujn konatulojn en Israelo, kiuj helpis al ni sperti interesan tempon. Entute estis tre interesa, kaj por ni maljunuloj, streĉa vojaĝo, dank' al Esperanto ni gajnis tre detalajn informojn pri Israelo kaj Jordanio.

En oktobro mi prelegis en la Munkena Esperanto-klubo du horojn pri nia vojaĝo en Israelo.

Spertoj de la Universala Kongreso en Bonaero

Jael Shelah

Saluton, mi estas Jaela. Ĉi-jare mi partoprenis la Universalan Kongreson en Argentino. Tiu lando unuafoje gastigis la UK-on. La Universala Kongreso Okazis en la ĉefurbo de Argentino – Bonearo. Tiu ĉi kongreso estis mia 11-a Universala Kongreso, en kiu mi partoprenis. En tiu ĉi kongreso partoprenis por la unua fojo esperantistoj el Nikaragvo.



Jaela ĉe ELI-tablo en la Movada Foiro en Bonaero

La evento plejparte okazis en la urbocentro de Bonaero, en la hotelo Panamericano, proksime al la Obelisko. Malfermo, fermo kaj ĉiuj vesperaj kulturaj programoj okazis en Teatro Metropolitan.

Kiel kutime, sabate vespere, la 26-an de Julio – por la Esperanto-tago, okazis la tradicia Movada Foiro, kie diversaj esperantistaj organizoj kaj asocioj informis pri sia agado, prezentis siajn estontajn aranĝojn kaj varbis novajn anojn. Dum tiu vespero ankaŭ mi prezentis la israelan Esperantomovadon. Sur la stando de Israelo (la foto supre) mi metis verdan kovrilon kiun Elvire donis al mi en Tel Avivo. Mi prezentis la lastajn numerojn de



"Israela Esperantisto", kelkajn muzikajn kompaktdiskojn, kelkajn poŝtkartojn de Jerusalemo, kaj tipan "israelan" manĝaĵon "Bamba"... La homoj gustumis kaj ĝuis, tre plaĉis al ili la "Bamba"... Kelkaj el ili eĉ komencis kanti "bamba la bamba" - Kaj petis pli. **Dum la Solena Malfermo mi salutis** la partoprenantojn de la 99a UK nome de la israelaj esperantistoj.

La ĉeftemo de la kongreso estis "Ĉu la nepoj nin benos? Streboj al daŭripova estonteco". Ĝi estis amplekse pritraktata en grandnombre ĉeestataj prelegoj kaj diskutoj.

Entute partoprenis preskaŭ 700 personoj el preskaŭ 60 landoj. Ili povis ĝui prelegojn, muzikon, arton, babiladon kaj amikecon dum la plenplena semajno.

Mi estis tre feliĉa renkontiĝi kun miaj karaj geamikoj, kun kiuj mi konatiĝis dum antaŭaj kongresoj. Geamikoj kiel, Mabel kaj ŝia filino Agustina el Argentino, Neil el Usono, Liba el Francio, Leonardo el Italio, kaj multaj pli.



En la foto oni povas vidi Synnove el

Finlando kaj min kun la memorlibro de Esti, kiun ŝi aĉetis poste. Mi ankaŭ ekkonis novajn geamikojn en Bonaero: Amarflilio el Brazilo kaj Alberto el Kubo.

Ĉi-foje mi ne partoprenis la ekskursojn kun la aliaj esperantistoj. Mi faris tion pro la tre multekosta prezo de la UK-ekskursoj, kompare al malaltaj prezoj, kiujn ofertis la argentinaj lokaj turismaj agentejoj. Pro tio mi ne havas fotojn de ekskursoj kun aliaj esperantistoj dum tiu ĉi kongreso.

Nova elemento eniris la kongreson: kelkaj sportemuloj ĝuis historian futbalmatĉon inter esperantista teamo formita surloke kontraŭ armen-devena teamo. La entuziasmo estis granda malgraŭ tio, ke la esperantistoj malgajnis. Eble tiu sperto fariĝos nova kongresa tradicio?

Nekredebla kaj tre stranga, almenaŭ por mi, estis la kompleta manko de Esperanto-reklamado en la urbo. Mi estis tre surprizita, ke mi ne trovis en iu ajn loko de la urbo afiŝojn pri la UK, kiu okazis tie dum tuta semajno!..... Neniu foto, neniu rimarko.....Eĉ ne en la eniro de la hotelo mem, kie okazis la kongreso....Ili nur aldonis la esperantan flagon al la multaj aliaj flagoj kiuj kutime estas hisitaj antaŭ la hotelo. Neniu apud la enirpordo de la hotelo. Iu kiu ne sciis pri la kongreso, tute ne rimarkus

ĝian okazon ... Mi ne vidis ian signon en aŭtobusoj aŭ trajnaj stacidomoj - neniu informo pri la kongreso, nek telefono, nek adreso de la kongresejo, eĉ proksime al la hotelo kie la kongreso okazis: tre tre strange! Mi kredas, ke por iomete kompensi tiun mankon, Neil kaj la partoprenantoj de la kongreso, kiuj ne partoprenis la tuttagan ekskurson merkrede, promenis en la urbo kun granda flago, kaj klarigis al la homoj kiuj interesiĝis, kio estas Esperanto.

En la foto de mia dekstra flanko staras Osmar el Brazilo, maldekstre staras Roland el Usono kaj Emile el Sud-Afriko



Mi tamen tre ŝatis la etoson dum la kongreso mem, kaj mi jam atendas la venontan Universalan Kongreson en Lillo.

Kion mi rakontis hejme pri mia sperto en Israelo?

Ludmila Novikova, Rusio

Komence de novembro 2013 apud Moskvo okazis Esperanto-aranĝo « ALTE », organizita de Moskva Esperanto-Asocio « MASI », dum kiu pluraj partoprenintoj prezentis mallongajn rakontojn kun montrado de lumbildoj pri landoj, kiujn ili vizitis. Por la prezentantoj estis metita kondiĉo – trovi la plej unikajn kaj mirindajn faktojn pri la prezentata lando, kiuj povus maksimume interesi la spektantojn. Do, mi prezentis Israelon, kiun mi vizitis en aprilo 2013, partopreninte la 7-an Azian Esperanto-kongreson kaj la antaŭkongresajn ekskursojn. Pri kiuj unikajoj kaj mirindaĵoj de Israelo eksciis miaj junaj samlandanoj el mia rakonto?

***Ho, donu Dio al la judoj sanon,
Por ĉiuj tempoj pacon kun esper' !¹***

Ĉiuj konsentis kun mi, ke Israelo ĝenerale estas la plej unika lando en la mondo. Kial? Ĉar ĝi estas la sola lando en la tuta historio de la homaro, kiu simile al la fabela birdo Fenikso renaskiĝis el sia propra cindro. Perdinte antaŭ preskaŭ du miljaroj sian ŝtatecon sub premeĝo de multnombraj invadintoj, la judoj, dissemitaj sur la tuta terĝlobo, sukcesis ne nur konservi sian nacian identecon, religion, kulturon kaj tradiciojn (kio jam estas ege mirinda!), sed per multegaj penoj kaj oferoj revenigi sian landon, sian popolon (kolektinte enmigrintajn samgentanojn el 102 landoj), revivigi sian jam mortan hebrean lingvon. Ili en sangaj bataloj reakiris sian ŝtaton kaj sian sendependecon. Laŭ decido de la Unuiĝintaj Nacioj, la 14-an de majo 1948 estis proklamita fondiĝo de la ŝtato Israelo. Ĉi-jare la 16-an de aprilo, dum mia ĉeesto en la lando, Israelo festis 65-jaran datrevenon de sia sendependeco, okaze de kiu la organizantoj de la kongreso regalis nin per festa vespermanĝo kun bongusta vino. Ĉe mi aperis tiam demando – kial do festado okazis en aprilo, sed ne la 14-an de majo? Oni klarigis al mi, ke la hebrea kalendaro baziĝas sur lunaj cikloj, pro kio ĉiuj datrevenoj ĉiujare okazas en diversaj tempoperiodoj.

Do, mi bonŝancis ĉeesti tiun ĉi gravegan eventon!

Por la rusaj esperantistoj estis interesaj miaj fotoj kaj komentoj pri la lingva situacio en Israelo. Mi koncize rakontis pri la hebrea lingvo, kiu antaŭe havis la saman sorton kiel la ŝtato de la hebreoj. Ĝi ĉesis ekzistadon en parola formo



La festa podio en la kibuco Ma'agan. Foto L.Novikova

¹ El la poemo « Mi kvaran jaron loĝas inter judoj », Dementjev A. Pripav k zemle obetovannoj : Moskvo, 2008. Traduko L. Novikova.

antaŭ multaj jarcentoj. La dissemitaj hebreoj parolis en diversaj lingvoj de la mondo. Sed ili ĉiam revis pri reveno al sia Tero Israela kaj pri revivigo de sia komuna lingvo. Estas admirinde, ke ili realigis tiujn ĉi revojn! Certe, tio okazis ne momente, sed dum longa tempo pere de persista batalado kaj laboro de la plej fidelaj gefiloj de Israelo. Kio koncernas la revivigon de la hebrea lingvo (sola ekzemplo de simila evento en la historio de la homaro!), tio okazis dank' al genienco de Eliezer Ben Jehuda, kiun oni nomas patro de la moderna hebrea lingvo, kaj liaj adeptoj. Li estis denaske nia samlandano (naskiĝis en Belorusio) kaj samtempulo de Zamenhof. Ambaŭ geniuloj benis la homaron per siaj lingvaj kreaĵoj. Tiun paralelon bone notis Mikaelo Giŝpling (fama Esperanto-poeto, kiu devenas el Rusio kaj nun loĝas en Jerusalemo) en sia poemo « Du nomoj » :

Du lingvoj, kies karaj sonoj
Naskiĝis dank' al du personoj,
Dank' al ilia mensa pov'...
Du nomojn vidas mi apudajn –
De Eliezer Ben Jehuda
Kaj Eliezer Zamenhof.

Du samaj nomoj, sama vervo,
Kaj sama streb' al nobla servo,
Kaj samaj jaroj, sama sort',
Kaj samaj moko kaj forpuŝoj
Kaj sama cel': al mutaj buŝoj
Alvenu unuiga Vort'!

Ĉi tiuj du idealistoj
Dum noktoj sidis ĉe vortlistoj,
Por ke foriĝu lingva bar',
Kaj agis kun persisto krea –
L' unua por la gent' hebrea,
La dua eĉ por la homar'



Gaste en hejmo de M.Gišpling (de maldekstre : T.Loskutova, M.Gišpling, Tsvi Sadan, L. Novikova). Foto de Ĥ.Bordin

Estas paradokse, ke mi kaj Miĥail Jakovleviĉ dum kelkaj jardekoj loĝis en la sama urbo (Moskvo), sed renkontiĝis unuan fojon ĉi-jare en Jerusalemo, kiam mi vizitis lian hejmon kune kun mia

samlandanino Tatjana Loskutova kaj niaj novaj israelaj amikoj Ĥanan Bordin kaj Tsvi Sadan.

Do, la hebrea lingvo nun estas ŝtata lingvo de Israelo. Jam por duono de israelanoj ĝi estas denaska lingvo. Por miaj aŭskultantoj estis interese ankaŭ ekscii, ke nia rusa lingvo estas same denaska por 20% de la israelanoj. Tia situacio formiĝis pro multnombraj enmigrintoj el Rusio kaj aliaj postsovetiaj respublikoj. La rusianoj povas ne maltrankviliĝi pro la lingvaj baroj dum vizitoj al Israelo – ili havas certan eblecon trovi tie ruslingvanon, kiu helpas al ili en implikaj situacioj. La rusa lingvo ne estas

subpremata en Israelo. Male, mi eksciis pri tia mirinda (kaj agrabla) fakto, ke en Israelo nun oni eldonas ruslingvajn librojn kaj periodaĵojn en la kvanto egala al tiuj en la hebrea lingvo! Kaj vi povas renkonti ruslingvajn ŝildojn sur la stratoj de la israelaj urboj (rigardu ĉi-sube).



Ruslingvaj eldonaĵoj ne estas raraj en Israelo. Foto L.Novikova

Kaj ne malpli interesa (kaj eĉ enigma) estas la ŝildo de la kafejo, kiun mi fotis apud la Oliva Monto en Jerusalemo. De la unua rigardo ŝajnas, ke estas nenio superordinara – dum la multnombraj vojaĝoj tra Eŭropo mi ofte renkontis kvazaŭ esperantajn titolojn. Ĉi tie mi ankaŭ pensis, ke la titolo de la kafejo simple koincidas forme kun la esperanta vorto. Tamen, kiam poste mi kontrolis laŭ diversaj vortaroj de la latinidaj lingvoj evidentiĝis, ke la vorto kun tia ortografio ekzistas nur en Esperanto. Neniu el la israelaj esperantistoj, kun kiuj mi pridiskutis la demandon, povis klarigi la devenon de tiu ĉi titolo. Lige kun tio mi rememoris la anekdoton, kiun prezentis al ni nia ekskursgvidanto Jehoŝua Tilleman. Demando: Kiu lingvo estas la dua uz-lingvo en Israelo? Respondo: La hebrea.

Do, ŝajne aperis nova versio de tiu ĉi anekdoto: *Ĉu Esperanto estas la tria uz-lingvo en Israelo?* Restas enigma la demando: kiu lingvo ja estas la unua?

El la naturaj mirindaĵoj de Israelo mi elektis por la prezentado la Biblio-faman Galilean Maron (lagon). Ĝi estas ne nur rave bela. Eblas diri, ke ĝi donas vivon al ĉiuj israelanoj per sia trinkebla akvo, per kiu oni ankaŭ akvumadas ĉiujn kultivatajn terenojn de la lando. Ĉefa fonto de la lago estas la rivero Jordano (ankaŭ Biblio-fama). Ĉirkaŭ la lago situas multaj sanatorioj, ripozejoj, turistejoj. Estas interesa tiu unika fakto, ligita kun la lago, ke ĝi havas kvar nomojn. Krom la unua nomo (pro la apuda regiono Galileo), oni ĝin nomas ankaŭ Tiberiada Lago (pro la apuda urbo Tiberiado), Kineret (pro ĝia violoneca formo; ankaŭ en la Biblio troviĝas tiu ĉi nomo) kaj Genosareta Lago (pro la apuda valo Genosar).



Amri Wandel kaj Cvi Loewenkopf en la kibuco Ma'agan. Fotoj L.Novikova

Ĉe la lago troviĝas tre specifaj loĝlokoj, kiuj nomiĝas kibucoj. Ni dum unu el la antaŭkongresaj ekskursoj, kiun gvidis prezidanto de Israela Esperanto-Ligo Amri Wandel, vizitis kibucion «Ma'agan», kie loĝas la

plej maljuna esperantisto de Israelo 92-jaraĝa Cvi Loewenkopf (ankaŭ unika fakto!). Li rakontis al ni pri fondiĝo kaj vivordo de la kibuco. La unuaj kibucoj aperis en Israelo antaŭ centjaro, post la vica amasa enmigrado de judoj el Orienta Eŭropo. Tio estis kolektiva formo de agrikultura mastrumado kaj defendado de siaj hejmoj kontraŭ multnombraj atencoj de malamikoj. Bedaŭrinde, nun kibucoj en Israelo neniĝas, ĉar junularo preferas translokiĝi al urboj, kaj en kibucoj restas plejparte maljunaj homoj. Oni ofte uzas nun la kibucojn por turismaj celoj, ĉar ili estas tre pitoreskaj.

Ni vizitis ankaŭ muzeon apud la Galilea Maro, kie ni vidis raran eksponaĵon – boaton de la tempoj de Kristo, kiun oni trovis en funda ŝlimo de la lago. Eble ĝuste en tiu ĉi boato Kristo kun siaj disĉiploj veturadis tra la lago, kaj poste paŝadis sur la akvospaco? Kaj nun bonvolu rigardi la suban foton, kiun mi faris en la muzea salono. Mi celis foti la vitran kubon kun modelo de la boato. Kiam poste hejme mi transmetis la foton en mian komputilon, mi kun mirego rimarkis strangan figuron en blanka vestaĵo post la kubo, kiu rigardas al la lago. *Mi nomis ĝin Vizio de la Galilea Maro. Tio estis la plej mistera por mi evento dum mia vojaĝo en Israelo!*



Vizio de la Galilea Maro. Foto L.Novikova

La poemo de la rusia poeto Andrej Dementjev (kiu longe loĝis en Israelo) kvazaŭ ilustras la foton.

«*Kiu do estas ĉi tiu? Ĉar li ordonas eĉ al la ventoj kaj al la akvo, kaj ili obeas al li* » Evangelio de Sankta Luko 8, 25

Jen tia en mia percepto estas Israelo – admirinda pro sia heroeca pasinto kaj nuntempo, pro siaj geniaj prauloj, kreintoj de riĉa kulturo, pro sia saĝa, persista kaj amikema popolo; rave bela pro la unika kaj varia naturo, karesa klimato, ĝojigaj koloroj; mirakla pro la miljaraj legendoj, kies

spurojn vi trovas ĉiupaŝe, kaj kies personaĵoj, konataj al vi ekde infanaĝo, sur la Tero Israela ĉie memorigas pri si, kaj eĉ mistere sekvas vin. La rakontoj pri Israelo ne estas elĉerpeblaj, la impresoj pri ĝi neniam paliĝos en la memoro.

Indas viziti Israelon!

Joela Egozi

Israelo estas ideala feria lando. Kial?

1. Israelo estas mezorienta lando relative longa sed mallarĝa ĉe la Mediteranea Maro. Ĝi havas tre diversajn pejzaĝzonojn: norde - staras la montoj, sude - oni havas tre grandan regionon de dezerto, kaj inter la du zonoj laŭlonge de la lando oni havas longan bordon kun multaj belaj plaĝoj. Dum kelkaj tagoj oni povas viziti tute variajn lokojn (kutime tiu sortimento estas trovebla nur en grandegaj landoj aŭ en kontinentoj).

2. Oni havas tre varian veteron. Vintre en la nordo estas malvarme kaj en la altaj montoj eĉ neĝas, sed sude estas sune kaj varme. Ĉiu povus preferi la lokon por sia ferio laŭvole.

3. Memkompreneble Israelo estas alloga por ĉiaj sportemuloj kaj ĝi estas paradizo precipe por akvaj sportoj. Norde – en la vintro ĝi havas bonajn kondiĉojn por la skisporto. Sude - ĉe la Ruĝa Maro, la urbo Eilat estas mondfama pro la somera vetero dum la tuta jaro.

4. Israelo havas specialajn akvajn kuracejojn. Kelkaj eŭropaj landoj financas la terapion de haŭtmalsanoj, kiuj estas nekuraceblaj en ĉi-tiuj landoj. La plej mondfama loko estas la Morta (Sala) Maro.

5. Israelo ankaŭ nomiĝas "Sankta Lando". Ĝi estas sankta por kristanoj, islamanoj kaj judoj, kaj ĉiuj havas preĝlokojn, konforme al sia religio. Laŭlonge de la lando oni havas sanktajn lokojn kaj antikvaĵojn, kiuj ligiĝas kun religiaj okazintaĵoj eĉ el la biblia epoko.

6. La orientado ĉi tie estas facila, ĉar la israelanoj estas tre gastama, helpema popolo. La lingvo kiun oni parolas estas hebrea, sed preskaŭ ĉiuj scipovas ankaŭ aliajn lingvojn, ĉar Israelo estas la domo de judaj enmigrintoj el la tuta mondo. Multegaj indikoj, publikigoj, ŝildoj, programoj, ekskursoj kaj eĉ gazetoj estas plurlingvaj. La lando estas vera Turo de Babelo.

7. Israelo prezentas konstante tre diversajn allogaĵojn kaj artan agadon de ĉia kulturo: kameraj kaj simfoniaj konĉertoj, operoj pere de lokaj kaj eksterlandaj artistoj, dancado (el klasika baledo ĝis modernaj dancoj), lokaj kaj tradukitaj prezentaĵoj, muzeoj kaj artaj galerioj.

8. La kuirarto ĉi tie estas tre varia. Estas israelaj mediteraneaj manĝaĵoj kaj tipaj judaj kuiradoj, kiujn la enmigrintoj alportis el siaj devenlandoj. Estas troveblaj manĝeblecoj por ĉiu gusto kaj poŝo.

9. Ĉu la situacio en Israelo ne estas danĝera? Israelo havas maljustan malbonan imagon preskaŭ en ĉiuj mondaj amaskomunikiloj. Efektive turistoj kiuj vizitas Israelon estas surprizitaj trovi tute pacan kaj trankvilan landon, kontraŭe al la bildo desegnita de la amaskomunikiloj en siaj hejmlandoj.

10. Esperanto-Ligo en Israelo (ELI) membras en UEA. Oni povas renkontiĝi kun samideanoj, viziti la klubon en Tel-Avivo kaj foje gastigi ĉe esperantistoj.

Ni kore invitas vin veni al

Israelo. Por aliĝi kaj spekti spertojn kaj fotojn de la antaŭaj kongresoj bv. viziti la retpaĝon de la Israela Kongreso <http://esperanto.org.il/ik.html>.

BENVENON AL
Kibuco - Jehiam



la 16-a
Israela Kongreso
de ESPERANTO
16-18.4.2015